Prezo 7€

Sennaciulo estas la oficiala organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
http://www.satesperanto.org
majo-junio 2012, n-ro 05-06 (1283-1284)

# Sennaciulo

## Tem-dosiero "Radio kaj Esperanto"



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Indignula movado en Grekio









Tiujn ĉi fotojn mi prenis dum la granda manifestacio de la 29a de junio 2011, sur la placo Sintagmo (Πλατεία Συντάγματος) en Ateno. Tiam la movado de Indignuloj kreskis kaj estis preta por batali kontraŭ la greka registraro. Tiun ĉi daton, la greka parlamento balotis favore al la financa programo kiu estas konata en Grekio kiel "Μνημόνιο" ("Mnemonio" - ordona memorando)... La manifestacio estis tre granda... miloj da homoj estis sur Sintagmo kaj cirkaŭ la placo, sed specialaj policaj grupoj ĵetis aeriajn gazojn kaj finfine finigis la manifestacion je la fino de tago.

Tiam homoj estis pretaj kontraŭi la ŝtatan mekanismon... tiam ni havis esperon. Pri hodiaŭ, mi ne povas paroli sammaniere. *Glavkos*





# Enhavo


**Redaktangulo 4**
SAT-ondo 4
Venontaj Tem-dosieroj 4
**Prepare al nia kongreso 5**
Raporto de la PK 5
Raporto de Ĝenerala Konsilantaro 8
Raporto de Konflikt-Komisiono 9
Raporto pri kontrolo de la SAT-kontado 2011 10
Raporto de Pacista Frakcio 10
**Tem-dosiero "Radio kaj Esperanto" 10**
Radio-elsendaj postrikoltoj 11
Kreiva detruado ĉe *Radio Libertaire* 13
Esperanto-programo en radio 3ZZZ en Melburno 15
La projekto Muzaiko 17
**SAT Aktivas 18**
Popol-politika aŭ klas-politika mondrigardo 18
En Francio SAT-anoj balotis "Paco" 19
La estonteco de Sankta-Imjero kaj la esperantlingvanoj 20
Tuttera patriotismo, "lirika dramo" post la 12-a de februaro 2012 22
Libero de Laŭra 23
Barcelono: 3 000 manifestaciantoj kun ĜKL kaj Laŭra 24
La Predikisto kaj la Sklavo (Torto post la morto) 25
Josip Broz Tito (Kumrovac 1892-Ljubljano 1980) 26
Tri Jubileoj 27
De niaj legantoj 29
Nekrologo 29
Staĝoj en Kvinpetalo 30
Donacoj dua trimestro 2012 30


*Nia revuo ekzistas ĉar volontuloj partoprenas sian redaktadon. Ni realvokas ĉiujn esprimi sin, per artikoloj, poemoj, recenzoj. Kaj kiam vi organizas aŭ partoprenas en okazaĵon, ne forgesu foti kaj raporti por la revuo.*

*Ĉi tie ni alvokas volontulojn por* ***eniri la skipon de "Sennaciulo"****. Ĉiuj kapablecoj estas bonvenaj: korektadaj, grafikaj, enpaĝigadaj, desegnaj, tradukadaj, komputilaj, organizaj...*

*Ĉiu sciu, ke la laboro estas agrabla kaj ne peza, ke la etoso estas agrabla, kaj ke oni laboru por plezuro, ne devige sed kiam oni disponas tempon.*

*La redaktoskipo, kiu funkcias memmastrumade, laboras krom per* Yahoo-*grupo ankaŭ per MediaViki-sistemo, kiun ĉiu vikipediisto jam bone konas kiel ege efikan kaj facilan.*

*Vd. almetitan formularon, troveblan ĉe SAT-retejo: satesperanto.org/Sennaciulo-2012-05-06-n-ro-1283.html*


**Praktikaj informoj**

Sennaciulo estas oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de SAT: 67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio

Telefono: + 33.9.50.71.01.97

Retadreso: satesperanto@free.fr

Retejo: http://satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n°1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: sat-x

**Plenum-Komitato de SAT**

Prezidanto: Vinko Markovo

Sekretario: Tereza Sabatier

Kasistino: Franjo Lévêque

Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent

**Sennaciulo**

Ĉefredaktanto: Robin' Beto

Enpaĝiganto: Pierre Soubourou "Ŝtonĉjo"

Ceteraj redaktantoj: Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Franciska Toubale, Serĝ' Sir', Ŝtonĉjo

**Kontribuojn sendu elektronike al:**

sennaciulo.redaktejo@gmail.com aŭ paper-poŝte al SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par: TROISA, Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart, Francio. Aperas dumonate – Bimestriel.

Directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel/jara abono: France 57€, autres pays / aliaj landoj: demander le tarif à notre agent du centre de SAT / peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.

Dépôt légal à la date de parution: N°CPPAP 0515 G 86567

# Redaktangulo

## SAT-ondo

Prepare al la Kongreso 2012, ni publikigas raportojn: vi konstatos ke disvolviĝas vario da novaj realigoj en nia asocio, plimulte vivigataj de novuloj en SAT. Ni plu varbu al nia asocio!

Ĉi-numera tem-dosiero invitas nin pripensi evoluon de radi-elsendado esperant-lingva en la historio kaj konsideri la vojon laŭiritan laŭ agadoj ĉe Svisa Radio Internacia, *Radio Libertaire*, 3ZZZ kaj Muzaiko. Enkonduka artikoleto demandas, kiel ni povas realigi la klerigajn celojn de SAT pere de ĉi tiu rimedo nun multe pli facile atingebla – ĉiu trovu propran respondon kaj ne hezitu ĝin publikigi en ĉi tiuj paĝoj!

Sekvas artikoloj de frakcioj Sennaciista pri naciismo kaj indignula movado, kaj Pacista pri agado dum-balota en Francio. Inter debat-vekaj artikoloj, retrospektivo pri la internaciisma movado liberecana kaj SAT, kaj ankaŭ pamfleto pri tuttera patriotismo. Hispaniajn okazaĵojn vi retrovos per du artikoloj pri subpremado nuna kaj kontraŭaj protestoj. Sinsekvas poste parodia kanto *La Predikisto kaj la Sklavo* kaj, okaze de la 120-jariĝo de la naskiĝo de Tito, ĉi ties biografieto. Ni plezurege publikigas paĝon "De niaj legantoj" ĉar de longega tempo ni ricevis legantleterojn kaj ĉar tiuj ĉi enhave agrablas. Mi kaptas la okazon instigi vin skribi al ni kritikojn kaj plibonigajn proponojn – ili des pli bonvenas, ke ni ekpripensas transformi la revuorganizon por jaro 2013.

Fine, mi atentigas vin pri alvoko al vi, ke ankaŭ vi kontribuu en la redaktoskipo. *Sennaciulo* aperas malfrue; por korekti tion, ni bezonas apartan forto-streĉon de ĉiu el vi. Ni disponigas ampleksan demandaron por kuraĝigi vin kaj helpi vin trovi propran lokon inter ni.

Helpu nin plibonigi la kvaliton de via revuo! ★

*La redakto-kunordiganto Robin' BETO*

## Venontaj Tem-dosieroj

1. **Katastrofo de Fukuŝimo: Ĝiaj sekvoj** (limdato por ricevo de artikoloj: 31-a de julio 2012 - kunordigo: Robin' BETO robin.beto@laposte.net). Estas bonvenaj ĉiaj kontribuoj, vivatestoj, rakontoj, fotoj, desegnoj ktp. La konsiderataj sekvoj povas esti sociaj, ekonomiaj, psikaj, unuopulaj aŭ kolektivaj, tujaj aŭ tre longtempaj. Se tiu ĉi atomenergia katastrofo ankaŭ estigis en vi memorojn pri alia tia katastrofo, ne hezitu sendi vian kontribuon. Tia ekstermezuraj katastrofoj tuŝas ĉiun vivestulon sur la tero: male al la kutima propagando, la sekvoj estas senlimaj kaj multdimensiaj. Ni ĉiuj lernu el la travivaĵo de aliaj por eviti ripeti ĉiam la samajn erarojn.

2. **Publikaj servoj: kiel evoluas la situacio en via mondparto?** (limdato por ricevo de artikoloj: 10-a de septembro 2012 - kunordigo: Robin' BETO robin.beto@laposte.net). Preskaŭ ĉie en la mondo disvolviĝas la nov-liberalisma politiko, privatigante publikajn servojn kaj detruante tiujn, kiuj ne povas esti privatigitaj, ĉar neenspezigivaj. Rakontu pri la situacioj, kiujn vi povas observi ĉirkaŭ vi, aŭ kiujn vi mem travivas eble kiel publik-serva laboristo. Kaj por kuraĝigi nin en tiu rezisto, raportu ankaŭ pri sukcesaj bataloj por defendo de iu tia servo, aŭ pri starigo de novaj publikaj servoj.

3. **Vartado de infanoj dum gepatroj laboras - Kiel tio funkcias ĉe vi?** (limdato por ricevo de artikoloj: 10-a de novembro 2012 - kunordigo: Tereza terezasa@club-internet.fr). Kiam la gepatroj laboras (eĉ kiam ili senlaboras kaj devas klopodi serĉadon de posteno), ili bezonas servon por zorgi pri siaj infanoj ekde ilia naskiĝo. Kiel tio estas organizita ĉe vi? Rakontu pri la avantaĝoj kaj ankaŭ pri la mankoj aŭ nesufiĉoj de la organiz-formo kiun vi konas.

*Ĉiaj kontribuoj (artikolaj, desegnaj, fotaj ktp) estu senditaj al la kunordiganto, kiu transdonos ilin al la redaktejo.*

**Dosier-tema propono, kunordiganto serĉata!**

*Kolektiva honorŝuldo* – proponita de Rob Moerbeek moerbeekr@gmail.com Mi nun okupiĝas pri la historia honorŝuldo de (eks/kaŝ/ankoraŭ) kolonihavaj ŝtatoj. Ĝenerale ekspluatantaj ŝtatoj havas tutpagotan ŝuldon al ekspluatataj kaj estontaj homgrupoj. Utilus prezentadi al rabŝtatoj la debeton, surbaze de la prezo de ĉiu murdo / mortigo / kripligo, ŝtelo / forpelo kaj detruo, ekstermo de specioj, elĉerpo aŭ malpurigo de akvo kaj aliaj bezonaĵoj... Ĉar tiuj ekonomiuloj impresiĝas nur per ciferoj. Necesas ankaŭ ke la civitanoj de ŝtatoj ne (sufiĉe) kotizantaj al la UN-sistemo mem konsciu sian honorŝuldon kaj memvole subtenu la fi-kritikatan mondan demokration.

**Vin tre interesas iu temo? Certe ne nur vi interesiĝas pri la temo. Proponu vian temon por ebligi reciprokan klerigon: skribu al la redaktejo ĉe**

sennaciulo.redaktejo@gmail.com**!**